# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno.

Temo.

## La edzino de l' tempovojaĝanto

Antaŭ jaroj mi tre ŝatis libron Edzino de tempovojaĝanto (Žena cestovatele časem). Mi ĝin tiam pruntedonis al iu - kaj malaperis el mia vivo ambaŭ. Dum UK en Brno mi ekvidis ĝian ekzempleron en Esperanto! Mi havis bonŝancon ĝin ne nur legi, sed ankaŭ kompari tekstojn kun la ĉehlingva, versio, kiun mi tiucele serĉis - kaj trovis - en vendejo kun malnovaj libroj. Do - se vi volas, venu ĝui la rezultojn de mia komparo! :-)

**Kiam:** la 25-an de marto 2026 je **18.30** (UTC+1)

**Prelegonto**: Mirka Tomečková

**Lingvo**: Esperanto

**Kie: La renkontiĝo okazos rete per Jitsi**

Jen la ligilo:
https://meet.jit.si/moderated/43f7d1610134c4b80b45e5560715ace9e1916f8261e962d99dea0449e8962abd

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

# Ni rekomendas

- Se vi pro laboro por UK ne scias, kia estis la UK en Brno, spektu filmeton de Rogener Pavinski.
- La 22an — 25an de majo 2026, Germana-ĉeĥa renkontiĝo, Olomouc. Informoj venos baldaŭ.
- La 6an de junio 2026 Ludu kun ni!, Brno, or
- 23an-26an de julio 2026 43-a Pola Esperanto-Kongreso, Bielsko-Biała, Pollando.
- 1-a — 8-a de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz, Aŭstrio
- Trapasu KER ekzamenon, montru, ke vi regas Esperanton.

★

# Programo en aprilo

La 1an **Bartoloměj Daniel, la esperantisto** – Oldřich Arnošt Fischer, *klubejo*

La 8an *Ankoraŭ neagordita. Komuna programo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom*, je la 19a h.

La 15an **Tabloludoj**, *klubejo*

La 22an **Moderna propagando, informa militado kaj protektado kontraŭ ĝi - enkonduko** – Josef Kalčík, *rete per Jitsi, je* **18.30**

La 29an **Roko Stránská en Brno** – Milan Kolka, *klubejo*

Pripensu jam, kiel vi povus kontribui al la programo. Tute mankas programo en la klubejo ekde aprilo kaj restas ankoraŭ liberaj kelkaj datoj por retaj renkontiĝoj. Ne hezitu proponi. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Dankon

Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic

Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni

SENT BY mailerlite